# SINPREZENTOJ DE LA KANDIDATOJ 2026 AL LA KOMITATO

| | |
|---|---|
| **Raymonde Coquisart** | Mi rekandidatiĝas al la komitato Paris Ile de France Esperanto por la jaro 2026. Mi estas estraranino de Esperanto France pri organizado de landaj kongresoj. Mi klopodos denove okazigi sabatajn konversaciajn rondojn ekde februaro, kaj kunorganizos la retajn ĝemelajn renkontiĝojn kun Debora Rossetti. Mi proponos alian aferon ... iom pli poste ... |
| **Romain Curis** | Juna Esperantisto, mi eklernis Esperanton en 2018 kaj iĝis membro en 2022. Esperantista kandidato por la eŭropaj elektoj de 2024. Komitatano de la francilia asocio ekde 2025. Mi ŝatas logikan gramatikon kaj interesiĝas pri lingvokreado. Krom Esperanto, mi estas membro de la asocio Tournesol kiu defendas pli demokratian kaj etikan artefaritan inteligentecon. |
| **Pierre Gauthier** | Mi lernis Esperanton en 1998. Komitatano ekde 2019, reprezentanto de nia asocio ĉe Espéranto-France ekde du jaroj, kasisto ekde unu jaro, mi aparte deziras konigi la kulturan heredaĵon de la Esperanto-movado. Mi instruas Esperanton je la unua nivelo ekde oktobro 2022 kaj zorgas pri la mesaĝoj de nia asocio en la sociaj retoj Mastodono, BlueSky kaj X. |
| **Pascal Hébert** | Candidat sur la liste Espéranto en 2019 et en 2024 j'ai été membre du konsilio de EDE de 2019 à 2024. J'ai passé le 27 novembre 2024 les tests de QI de MENSA (Association regroupant les 2% des personnes les plus intelligentes) et j'ai réussi les tests qui m'ont même classé parmi les 1% les plus intelligents. En 2025 j'ai participé aux activités de Mensa et y ai notamment présenté l'espéranto. Concernant l'espéranto je tiens à préciser que je ne fais pas partie des gens (ils me semble hélas majoritaires chez les espérantistes) qui considèrent l'espéranto comme une fin en soi. Pour moi l'espéranto doit rester un moyen d'atteindre un monde plus fraternel. |
| **Maureen Hurstel** | Mi estas konata kiel Bubalo ene de Esperantio sed Maureen estas mia vera nomo. Mi ĉeestas Esperantion jam de muuultaj jaroj kaj nuntempe aktivumas organizante la junularajn Esperanto-renktiĝojn de Esperanto-Francilio kun Ava kaj agadas ĉe la Verdaj Skoltoj, kvankam mi nuntempe ne tre aktivas. Post la fino de miaj studoj, mi ŝatus aktivumi ene de Esperantio por ke pli da homoj povu lerni ĝin kaj aktive uzi ĝin por komuniki. |
| **Didier Janot** | Mi eklernis Esperanton en 2004 kaj komencis agadi por Esperanto kelkajn jarojn poste. Mi zorgas pri nia retpaĝaro https://esperanto.paris kaj pretas daŭrigi. Aldone mi estas sekretario de ILEI-Francio (https://eventaservo.org/o/ILEI-Francio), landa sekcio de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI). |
| **Aleks Kadar** | Esperantisto ekde 1999. En Francilio mi strebas partopreni ĉiujn Esperanto-kafejojn kaj laŭeble regule la ceterajn eventojn organizatajn de nia asocio. En 2025 mi partoprenis 18 tiajn eventojn. Mi zorgas pri interna komunikado en Eventa Servo kaj Vacapo. Prezidanto de Esperanto Parizo Francilio ekde 2024, mi pretas resti aktiva en la komitato de la asocio. |
| **Christian Lefèvre** | Mi estas 56 jaraĝa. Mi eklernis Esperanton en la jaroj 2000-2001, sed havis aliajn prioritatojn kaj ne facilajn okazojn uzi ĝin. Ekde 2022, mi denove komencis iom uzi Esperanton… Ĉi-jare mi decidas vere uzi ĝin kaj agadi pri ĝia disvolviĝo. Krome, nun mi ferias senlime kaj emeritiĝos fine de 2026. Pro tio, mi bonvolas kandidatiĝi al la komitato de la grupo Ile-de-France de Esperanto Francio.<br>Mi ne vere scias kiel / kiom mi povas helpi. Sed mi scias, ke "forĝante, oni forĝistiĝas", do "uzante Esperanton, mi pliesperantiĝos", kaj la agado helpos samtempe disvolvi Esperanton kaj plibonigi mian Esperanton. Ekzemple, sekve mian proponon, ni komencas pripensi pri regule kunveni kaj agadi surloke en Essonne... |

| | |
|---|---|
| **François Lo Jacomo** | Esperantisto ekde 1971, mi nun aktivas en pluraj organizoj (UEA, Akademio, Greziljono, EDE), interalie pri rilatoj kun Unesko. De kelkaj jaroj mi gvidas kurson en Parizo (Ĉerizejo) kaj partoprenas en kelkaj agadoj de nia Francilia Esperanto-Federacio. |
| **Laure Patas d'Illiers** | Esperantisto ekde 2012. Emerito. Kunorganizas la kulturajn vesperojn. Verkas en Esperanto. Listestro 2024 de la politika movado Eŭropo Demokratio Esperanto. Delonge komitatano de la francilia federacio, ĝia sekretario ekde 2020. |
| **Marianne Pierquin** | Bibliotekisto, mi eklernis Esperanton antaŭ 12 jaroj interalie dank'al nia Federacio. Nun, Esperanto fariĝis mia ĉiutaga lingvo. Pasintece mi jam aktivis kiel komitatano kaj pretas daŭrigi la laboron por nia asocio kaj ĝiaj membroj. |
| **Viktoro Simonnet** | Esperanto estas mia familia lingvo jam de ĉirkaŭ 90 jaroj. Mi fariĝis franciliano komence de la jaro 2007 kiel studento pri komputorado. Poste mi laboris en tiu fako ĉefe en Francilio. Mi strebas partopreni eo-agadon laŭ miaj eblecoj en Francilio i.a. Esperanto kafejoj, kulturaj vesperoj, organizado aŭ deĵorado en budoj ekzemple de edukada salono aŭ homara festo. Ekster Francilio, mi partoprenis i.a. la lastajn Polan Esperanto Kongreson, Aŭtunan staĝon en Greziljono, Zamfeston en Lillo, la nacian kongreson en Nanto kaj en la UK en Brno. Ĉefe ekster Esperantujo, mi kutimas sidi en diversaj asociaj komitatoj jam ekde kiam mi estis gimnaziano. |